



Kulturaj Kajeroj

É. MANÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 17 - ROCHEFORT, Francujo

J A R A B O N O :

MAJO - JUNIO - JULIO - AŬGUSTO

Simpla : 7 fkoj } P. BABIN
Bonfara : 12 fkoj } 5, Bd Buisson, 17 - Rochefort
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1966

3 - 4

KULTURAJ KAJEROJ

1966

Majo - Junio - Julio - Aŭgusto

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

EN H A V O

Omaĝe al la fondinto de Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Lando de kontrastoj
Islando J. Rousseau

Unu genia aventur-romano
Manon Lescaut M. Duc-Goninaz

Kial unu dolmeno en Baugé ? R. Martin

Gravaj datrevenoj

La lando de reĝino Maud (2)
Zorja Danovskaja

Por via distro P. Chevalier - B. Jarlier

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.
Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

Omage al

La Fondinto de Grésillon

Sro Henri Micard, konata de ĉiuj esperantistoj en Francujo kaj de granda parto de la tutmonda esperantistaro, fondinto de la Esperantista Kulturdomo, mortis la 26an de majo post longaj suferoj. Malaperis homo al kiu la esperantistoj ŝuldas multon.

Antaŭ la milito en 1936 li fariĝis ĝenerala sekretario de la Grupo de Francaj Esperantistaj Instruistoj, kaj de tiu tempo ĝis la milito, li organizis ĉiujare, en konvena loko, Someran Lernejon, kien kunvenis esperantistaj ĝeinstruistoj por lerni kaj praktiki la lingvon, kaj ankaŭ por diskuti pri propagando en la instruista medio. Kompreneble la milito ĉesigis ĉiun eblon sur la kampo esperantista. Tuj poste renaskiĝis la Grupo de Esperantistaj Edukistoj kaj Micard povis reorganizi la Somerajn Lernejojn. Li vizitis multajn lokojn, sed la organizado fariĝis pli kaj pli malfacila pro diversaj kialoj.

Tiam ĝermis en la spirito de Micard la ideo havigi, ne nur al la ĝeinstruistoj, sed al la tuta esperantistaro, lokon sufiĉe grandan por organizi ne unu jaran renkontiĝon sed plurajn. Por ke ĝi estu la Domo de ĉiuj esperantistoj, estis necese ke ĝi estu sendependa.

Tri gravaj problemoj prezentiĝis : kiu povos organizi la aferon ? kie trovi lokon ? kiel pagi la elspezon certe grandan ? La unua problemoj estis jam solvita ĉar Micard estis sufiĉe vigla, batalema kaj diplomata por sukcesi. Li zorgis pri la du aliaj problemoj helpata de pluraj kamaradoj ĝeinstruistoj. En Septembro 1951 estis ŝtargita societo kun kooperativa karaktero, t.e. ke ĉiu ano de la societo disponas nur pri unu voĉo en la ĝeneralaj kunvenoj kiom ajn nombraj estas liaj « financaj partoj ». La prezidanto elektita estis kompreneble Micard, ĉiu « financa parto » estis (kaj ankoraŭ estas) 100,00 frk. Tre rapide la kasisto ricevis monon sed kiam ĉesis la monsendoj, la tuta sumo reprezentis eĉ ne duonon de la necesa elspezo. Nur post multaj klopodoj,

dank'al la sindonemo de pluraj amikoj, la societo povis finfine akiri bienon. Dume Micard transerĉis sian propran regionon por trovi taŭgan akireblan konstruaĵon. Li deziris ĝin trovi en sia regiono ĉar la distanco de Parizo ne estas tre longa, ĝi troviĝas en turisma loko proksime de la Loire valo, ne tro malproksime de la maro ; li ankaŭ sciis ke nur li povis zorgi pri la estrado de la Domo kaj estis necese, ke ĝi ne estu tro malproksima de lia loĝloko. Post esperoj kaj malesperoj, kies detaloj povas pleniĝi libreton, fine aperis sur la esperantista horizonto Grésillon, ĉarma granda Domo en bela parko. Post la aĉeto la societo « Kulturdomo de la Franclandaj Esperantistoj » estis posedanto de herbejoj, parko, lago, granda ĝardeno, kaj de bela konstruaĵo... tute malplena. La elektra kurento kaj la kuranta

akvo venis nur en parteton de la konstruaĵo, oni devis akiri meblaron, kuirilojn, manĝilaron, ktp... kaj la kaso estis malplena. Denove sindonis la Prezidanto per prunto de mebloj, teleroj, ktp. kaj ankaŭ amikoj kiuj multe laboris por ke ĉiuj ĉambroj ricevu lumon kaj akvon.

Dum la somero 1952, Grésillon malfermis siajn pordojn kaj estis vizitata de 150 ĝeesperantistoj el kiuj multaj komprenis la kialon de la manko de komforto, sed kel-

kaj tute ne.

Tiuj kiuj vizitis la kastelon en 1952 kaj revenas nun povas konstati la grandegan paŝon faritan. Nun Grésillon estas komforta. Kaj tiu grandega paŝo ni ŝuldas al Ĝesinoroj Micard, ĉar la historio de la familio Micard kaj la historio de la Kulturdomo dum 14 jaroj interplektiĝis. Ĝesinoroj Micard ricevis helpon sed la pli grandan parton de la laboro ili mem faris.

La unua paĝo turniĝis. La epoko de la pioniroj finiĝis. Tiuj kiuj prenis sur sin la respondecon de la daŭrigado de la afero ne rajtas esti malfideluloj. Ili neniam forgesu ke ili ricevis grandegan heredaĵon de granda homo, kies spirito ĉiam restu en lia kreaĵo.



Esperanto tra la Mondo



La listo de internaciaj renkontoj plilongigas...

— Turisma Esperanto restado, apud la mezepoka kastelo Zvikov, en Ĉeĥoslovakio, 7-14a de aŭgusto. Skribu al : Vlastivedné Muzeum (Turisma E-restado), Písek, Ĉeĥoslovakio.

— Feriaj Tagoj, en Ljubljana, 10-14a de aŭgusto (Jugoslavio).

— Hispana Esperanto Kongreso en Bilbao, 19-23 7, Barrencale Barrena 7, la dekstre, Bilbao 5.

En Budapeŝto : la arta festivalo.

Samtempe kun la kongreso, okazos arta festivalo kies programo inkluzivis prezentadojn de Internacia Arta Teatro, de Bulgara Esperanto-teatro, de teatro Populara de Lodz (la usona verko « Katakai », jam sukcese enscenigita dum la kongreso de Tokio). Ankaŭ estos prezento de la ŝtata pupoteatro de Budapeŝto, kies artistoj tute speciale lernis esperanton.

La kongresoj 67 kaj... 1968 prepariĝas.

— En Tel Aviv, la kongresa komitato de la Universala Kongreso de 1967 komencis labori : la internacia sekretario Sro Pompilio, restadis tri semajnojn en Tel Aviv. Okazis gazetara konferenco kaj intervjuoj en radio. Novaj esperanto-grupoj estis kreitaj.

— La estraro de U.E.A. akceptis la inviton el Madrid, por la kongreso 1968.

El Germana Demokrata Respubliko.

— Esperanto kunvenon dum la foiro de Leipzig partoprenis 150 personoj el diversaj landoj.

El Hindujo

— Bengala Esperanto-Instituto preparas vastan ekspozicion kiu okazos de la 20a ĝis la 24a de decembro. Sendu materialon, esperanto-presadojn kaj informilojn en angla lingvo al : B.E.I. Sro L. Sinha, Vinaya-Bhavana, Santiniketan, W. Bengal, Hindujo.

El Hungario.

— Okaze de la Universala Kongreso en Budapeŝto, la hungara poŝto eldonos specialan poŝtmarkon en valoro de 1 forinto. Aliflanke, okaze de pluraj naciaj kongresoj, en diversaj landoj, speciala poŝtstampo estos uzita.

Fakaj asocioj.

— Fondiĝis « Internacia Historiista Fakgrupo » (IHF). La korespondadreso estas : S-ro E. J. Görlisch, Postfach 70, A-1094, Wien, Aŭstrio.

— Radio-Amatoroj : en la internacia kunveno de radio-amatoroj en Knokke-Zoute, Belgio (16-18 de septembro 66) okazos renkontiĝo

de la esperantistoj. Adreso : Sro K. Poupeye, ON4PU, Karel de Stontelaan 78, Brugge.

— Tekindustrio : Aperis la unua numero de « La teksumisto », por ĉiuj branĉoj de la teksumado. Adreso : Sro Manfred Führer, Pf. 153, CH-4900 Langenthal, Svisujo.

— Ornitologia Rondo Esperantlingva (O.R.E.) : revuo : « La Mevo ». Sekretario : L. Bechtold, 3568, Gladenbach, Hess. Forstamt, Germanujo.

— Ĉu vi konas « Internacia Scienca Asocio Esperantista » ? Ĉu vi legas « Scienca Revuo » (jarabono : 30 steloj) ? Kontakto la sekretario : I S A E, Zagrebačka 24, Sarajevo, Jugoslavio.

— En Belgujo kreiĝis nova organizo : « Esperanto en la Lernejo ». Adreso : S-ro Vanderlinden, Dorp 44, Astene-Deinze.

Eldonaĵoj.

— En Moskvo, aperis « Versoj Elektitaj » de la poeto Sergej Jesenin.

— En Hungario : nova eldono de « La tragedio de l'Homo », de Madach, traduko tute reverkita de Kalocsay.

— « El Japana literaturo » (pecoj de dudek aŭtoroj, plej parte verkitaj inter 1917 kaj 1928). Prozaĵoj kaj poemoj.

— Nova broŝureto de U.E.A. aperis : « La Esperanto Societo ». El ĝi, la grupestroj ĉerpos multajn ideojn por la vivo de niaj Societoj esperantistaj.

— La libreto de F. Faulhaber : « Ne tiel sed tiel ĉi ! » (konsiloj pri stilo).

— Ilustrita prospekto pri ceramiko (maŝinaro, produktoj, ktp) el Ĉeĥoslovakio. Skribu al ZK Esperanto . . Prerovske strojirny, Prerov, Ĉeĥoslovakio.

— Kaj ne forgesu la luksan riĉe ilustritan turisman revuon « Ripozoj », Adreso : Bulv. Tolbuhin 51, Sofio, Bulgario.

Statistikoj.

— Dum 1965, okazis 1807 radio-elsendoj en internacia lingvo, el 25 stacioj de 13 landoj.

— Laŭ cetera ne kompleta enketo, aperas ke minimume 1300 lokaj grupoj funkcias en 39 landoj.

— Oni nun preparas enketon pri sciencistoj-esperantistoj. Skribu al Sro Wim De Smet, Drogenberg 36, Overijse, Belgujo.

— Minimume 86 sciencaj kaj fakaj periodaĵoj eldonataj en diversaj landoj publikigis artikolojn aŭ resumojn de artikoloj en esperanto de post 1950.

Lando de Kontrastoj

ISLANDO

La disvolvado de la rimedoj de komunikoj, kaj ĝia rapideco ĉiam pli grandiganta alportas — kiel dirite — « la mondon ĉe via pordo ! »

Sed kiu pensas pri Islando ?

Se oni parolas pri ĝi, oni tiam imagas landon kvazaŭ nekonatan, lokitan ie ĉe la Norda Poluso, tute kovritan per glacio kaj precipe negastaman...

Sed tamen...

Islando, kun 103.000 km² estas tiom vasta kiom 18 francaj departementoj. Ĝi mezuras 300 km. de la nordo al la sudo, kaj 500 km. de oriento al okcidento.

Cu ĝi estas tamen tiel izolita ? Ĝi kuŝas je 850 km. de Skotlando, 1050 km. de Norvegujo (tio estas la distanco de Dunkerque al Perpignan !). La Feroa-insularo kuŝas je 400 km. kaj la Groenlanda bordo je 350 km.

Oni ofte nescias, ke Islando estis malkovrata je la IX j.c. kaj loĝata ekde 874 de Norvegaj marveturantoj, kiuj lokigis tie kun siaj sklavoj (el irlanda kaj skota deveno), kiujn ili estis kaptintaj okaze de aliaj marekspedicioj.

—o—o—o—

La unua formo de registaro estis respubliko, en kiu la potencon posedis la ĉefoj (Godar). Estis 39 ĉefoj, kaj ĉiu samtempe estis ĉefpastro de la nordaj paganaj dioj (tial, oni nomis ilin « godar » - god = dio).

La unua kunveno de la Parlamento okazis en 930, ĉe la loko, kiu ankoraŭ nuntempe nomiĝas « Thingvellir » (parlamenta ebenaĵo).

La unuaj leĝoj devenis de norvega leĝaro, sed ĉe la komenco ili estis nur parolaj leĝoj, kiujn oni eldiris dum la kunvenoj de la « Althing », kiu funkciis ankaŭ kiel tribunalo. La skribitaj leĝoj datumas de 1117-1118, kaj ili estas la unuaj dokumentoj konataj en la islanda lingvo. Ĝis tiam, estis do necese scii ilin perke, kaj ofte junuloj restis ĉe iu leĝosciulo por studi kaj lerni la leĝojn.

En la jaro 1000, la Althing decidis la pacan alprenon de la kristanismo, kaj tio okazigis la alprenon de nova alfabeto (por anstataŭi la runan alfabeton tiam uzitan) kaj la kreadon de lernejoj, kie oni studadis la novajn sciencojn de la katolika eklezio.

Tiupoke ankaŭ islandaj marveturantoj albridiĝis ĉe Labrador kaj verŝajne veturis ĝis la elfluo de la Saint-Laurent-riverego, tiel malkovrante la amerikan kontinenton preskaŭ 5 j.c. antaŭ Kristoforo Kolombo !

Dum la sekvantaj jarcentoj plivastiĝis la eposaj rakontoj, konataj sub la nomoj Edda aŭ Saga, kiuj rakontis la islandan historion, kaj la historion de la reĝoj norvegaj aŭ alilandaj.

Se oni eldonus nuntempe tiun literaturon per moderna ortografio, oni konstatus, ke ĝi povus esti la verko de nuntempa verkisto kaj la hodiaŭaj infanoj spertus ne multan malfacilaĵon por ilin legi.

Je la XIII j.c. Islando transpasis sub la superpotenco de la reĝo de Norvegujo, kaj de 1331 ĝis 1918 sub tiu de la reĝo de Danujo. En 1550 mortis, murdita, la lasta katolika episkopo de la lando. De tiam, la luterana religio estas la ŝtata religio, ektrudita de la Danoj.

Islando suferis grandnombrajn plagojn : vulkanajn erupciojn (10 dum nur la 14 j.c.), nigran peston, kiu en 1402 pereigis 2/3 de la enloĝantoj, malsategon en 1785, kiam 9.000 personoj mortis pro malsato. En 1695, la insulo estis ĉirkaŭita de flosantaj glacioj, kio pliakrigis la klimatajn kondiĉojn jam sufiĉe malmildajn. Ĝis la komenco de la XIXa j.c. Islando suferis ankaŭ pro la dana komerca monopollo, kaj poste pro la kontinenta blokado de Napoleono.

Dum la XIXa j.c. tamen, la vivkondiĉoj pliboniĝis. En 1818, oni fondis la Nacian Bibliotekon, kaj ĉirkaŭ 1830, la ekonomia progreso okazigis politikan vekigon. En 1840 aperis nova homo, Jon Sigursson, kiu dum kvardek jaroj estis la politika ĉefo de la lando, kaj la kaŭzanto de la luktado por sendependeco. Neniu ĉefa ŝanĝo estis atingita tiel longe dum Danujo havis konservativan reĝimon. Sed en 1901, provoj estis ekkontentigitaj celante al kontentiga solvo pri sendependeco. En 1918, la 30an de novembro, la luktado por tiu sendependeco finiĝis per la AKTO PRI PERSONA UNUIGO kiu ligis Islandon al Danujo, sed lasis al ĝi sufiĉan memregecon en la administrado de siaj aferoj. La kondiĉoj de tiu Akto estis validaj dum 25 jaroj. Estis ankaŭ antaŭvidita, ke ek de 1940 Islando povus peti ĝian reekzamenadon. Tion faris la Islanda Registaro, kaj post ĝenerala popolvoĉdonado, la Sendependa Respubliko Islando estis proklamata en Reykjavik, la ĉefurbo, la 17 an de junio 1944.

Islando (aŭ lando de glacio) ŝuldas sian nomon al la norvega vikingo Flocki, kiu preterpasante ĝian bordon en 864, vidis nur glacieron. Malgraŭ ĝia nomo, ĝi kuŝas sube de la polusa cirklo, krom la kabo de Fifstan kaj la insuletoj en la Nordo. Ĝi estas lando grandparte montara. La malaltaj regionoj kuŝas ĉe la sudo, kie la marbordo estas ebena ; tial ĝi estas malpli loĝata kaj frekventata de la ŝipistoj ol la nor-

da, orienta kaj okcidenta bordoj, kiuj havas tre disŝiritan reliefon, kun golfetoj kaj fjordoj, kie estas instalitaj multaj havenoj. 13 % el la teritorio estas kovritaj per glaciejoj (sude kaj sudcentro de la insulo). La Vatnajökull, sola, kun 8.500 km² estas tiom vasta kiom, kune, ĉiuj glaciejoj de la Alpoj !

Islando estas ankaŭ la plej vulkana regiono en Eŭropo. Oni kalkulas, ke dudekon da vulkanoj estis aktivaj depost la enloĝigado de la insulo, kiu tiel suferis pli ol 1.000 erupciojn ! La plej konata el la vulkanoj estas la Hekla (23 erupcioj, la lasta en 1947). Poste okazis la erupcio de la vulkano Askja (en 1961) kaj la submara erupcio kiu en 1965 naskis

novan insulon Surtsey, ĉe la suda marbordo, proksime de la Vestmann insularo.

Tiu vulkana aktiveco klarigas la ĉeston de la 291 varmaj fontoj kaj de la 854 gejoj, el kiuj la akvo elŝprucas je temperaturoj de 10 ĝis 100° Unue uzataj de la kamparanoj por la mastrumaj laboroj kaj eĉ por la trinkigado de la bestaro, tiuj fontoj estas nun orde uzataj por la hejtado de la domoj kaj ankaŭ de la florvarmejoj kie oni kulturas ankaŭ fruktojn kaj legomojn nekutimajn ĉe tiu latitudo (vinberoj, bananoj, tomatoj, ktp).


La klimato estas oceana. Reyjavik havas mezan temperaturon, kiu varias de -2 en januaro ĝis +12 en julio ; oni kalkulas projure 1.300 horojn da sunbrilo. Sed se la « Gulf-stream » efikas sur la mezvarma klimato de tiu insulo, la polusaj glacioj sukcesas tamen blokad iujn havenojn ĉe la norda kaj orienta marbordo. La arbo estas malofta en Islando. La herbo estas mallonga, kaj kreskas ĉefe apud la bordoj kaj en la valoj. La montara herbo, malofta kaj disa, ebligas tamen la bredadon. Ŝafaro estas la ĉefa elemento. La sovaĝa faŭno enhavas ursojn, bovojn, blankajn vulpojn. La bredado de la boaco (importita el Norvegujo) estas protektata de la registaro por malebligi la malaperon de tiu besto. Krutaj rokoj en la Vestmann-insularo estas uzataj kiel rezervejoj por la fraterkuloj kaj la blankaj suloj. Salmoj kaj trutoj estas la ĉefaj riveraj fiŝoj. En la maro, oni fiŝkaptas balenon, segilfiŝon, marhundan, sed precipe moruon kaj haringon (927.000 tunojn en 1964).

La fiŝkaptado okupas la ĉefan parton en la islanda industrio : sekigo, glaciigo, preparado de la fiŝoleo. La bredado ebligas laktejojn, fromaĝfabrikojn. Uzino pri margarino provizas la konsumadon de la tuta lando. La ŝipkonstruado ankaŭ estas tre grava. Ĉiuj fiŝkaptaj islandaj ŝipoj malpli ol 200 toneloj estas enlande konstruitaj. Ni menciuj fine la konstruindustriojn kun iliaj flankindustrioj kaj la gravaj klopodoj entreprenitaj de post kelkaj jaroj sur la kampoj de la publikaj laboroj.

Kelkajn vortojn fine pri la loĝantaro. Ĝi estas ĉefe el norda deveno (norvega, sveda, dana) ; sed oni ne devas forgesi la keltan devenon, reprezentitan ĉe la komenco per la sklava klaso. La prilogo estas la plej malforta el Eŭropo : malpli ol 2 loĝantoj en unu km². 14 loĝokoj, enhavantaj les 3/5 de la tuta loĝantaro, havas la titolon « urbo » kun ĉiuj rajtoj kaj devoj, kiujn tiu stato entenas.

Jen do Islando, lando de kontrastoj, kie la fajro apudestas glacien, kaj kie la vilaĝoj ŝajnas pupdometoj sin ŝirmantaj ĉe la piedo de gigantaj montoj.

Jack ROUSSEAU.



**RESTAS NUR KELKAJ LIBERAJ
ĈAMBROJ POR NIAJ SOMERAJ
PERIODOJ.**

TUJ ALIĜU

MANON LESCAUT

(el prelego prezentita en *Gresillon* - Pasko 66)

La romano de Abato Prévost *Manon Lescaut* atingis tutmondan famon, kaj mi ne intencas ĝin rakonti al vi, kiuj verŝajne ĝin legis aŭ en la franca lingvo aŭ en traduko nacilingva aŭ esperanta. Tamen ne estas superflue doni kelkajn rapidajn informojn pri la aŭtoro kaj cirkonstancoj de apero de la verko.

Antoine-François Prévost naskiĝis la 1an de aprilo 1967 en burĝa familio Post studoj en jezuitaj lernejoj, li eniris la armeon, kiun li baldaŭ forlasis, restadis en Holando — kie oni atribuas al li diversajn aventurojn — kaj reveninte Francujon en 1720 eniris benediktanan monaĥejon, verŝajne post amĉagreno, kaj paŝtrigis en 1726. En 1728 li troviĝis en Parizo, kie li komencis verki la « Memorarojn kaj aventurojn de Nobelo » kaj forfuĝis de sia abatejo... Li devis ekziliĝi en Anglujon, Holandon, denove Anglujon. La 7-a kaj lasta volumo de la « Memoraroj de Nobelo » — nia romano — estis publikigita en Amsterdamo en 1731. Poste aperis « La angla filozofo aŭ historio de S-ro Cleveland, neleĝa filo de Cromwell ». En 1734, li revenis Francujon, kie li restis, malgraŭ kelkaj eksterlandaj vojaĝoj, motivitaj de malagrablaj aventuroj. Li finis sian vivon kviete, for de la mondo, en Chailot, poste apud Chantilly, kaj mortis en 1763...

... Kiel ni diris, Manon Lescaut estas la 7-a volumo de tuta serio, titolita « Memoraroj kaj aventuroj de Nobelo ». Fakte, la ĝusta titolo estas « Historio de la kavaliro Des Grieux kaj de Manon Lescaut », kaj efektive la ĉefa heroo estas ja Kavaliro Des Grieux : la tuta historio rakontas la naskiĝon ĉe Des Grieux de fatala pasio, la defalono de Des Grieux kaj la finan punon. Des Grieux estas la viktimo de la fataleco de la pasio, kiu posedas tutan lian personecon, fizikan kaj moralan, kaj la priskribo de tiu pasio faras la tutan valoron de la romano. Sub la formo de romano, Prévost pritraktas temon indan je racina tragedio...

... Kiel mi povis bapti « aventurromano » verkon, kiun ĉiuj prave difinas kiel modelon de amromano?

Manon Lescaut estas esence amromano. Tamen estas tiuj videble, ke en ĝi sufiĉe vastan lokon okupas tio, kion oni tradicie nomas « aventurromano ». Ni devas unue rimarki, ke pura aventurromano estas minora ĝenro, kiu ne donis ĉefverkojn en la franca literaturo. Plej ofte la aventuroj trovas lokon en la kadro de alia ĝenro...

...Unua rimarko : la romano de Prévost prezentas novaĵon en la franca literaturo. La aristokrata romano de la XVII-a jarcento (d'Urgé, Scudéry, La Calprenède...), plena je patoso, mirindaj aventuroj, rigidmienna heroismo, cedis lokon al la romano burĝa kaj satireca (Burĝa romano de Furetière, Komika romano de Scarron) : la romano de la XVIII-a jarcento sekvas tiun ĉi tradicion (Gil Blas, de Le Sage, La lama diablo, de la sama, la romanoj de Voltaire)...

... Sed Prévost trovis sian inspiron ĉefe en la

angla literaturo. Li legis multajn romanojn kaj vojaĝrakontojn. Robinson Crusoe aperis en 1720. Sub tiu influo Prévost enkondukis en la francan literaturon temojn, kiuj antaŭe ne ekzistis en ĝi, sed kiuj estis laŭmodaj en Anglujo.

— La kriminalaj rakontoj. Vidu kian gravecon havas la aventuroj en malliberejoj en Manon Lescaut kaj la aliaj romanoj Prévost.

— La aventuroj de amoristinoj. En Manon Lescaut, la ĉefa — kaj simpatia — heroino estas diaboĉulino ; tio estas senprecedenca fakto en Francujo. Oni eĉ faris interesajn komparojn kun « The Illustrious French Lovers » de Penelope Aubin (1727), en kiu la geherooj travivas aventurojn similajn al tiuj de Des Grieux (unu el la heroinoj nomiĝas Manon), kaj kun verkoj de Daniel Defoe : Moll Flanders (1722) kaj Roksane (1724).

... Kiuj do estas la romanecaj okazaĵoj en Manon Lescaut? Kiel ni konstatis, tiuj okazaĵoj estasigitaj kun la amintrigo. Pro sia temo, la romano de Prévost ne povis esti interna priskribo. La aventuroj de la geherooj estas do neceseigitaj kun la evoluo de la agado, ili estas integritaj en la agado. La defalo de Des Grieux devas esprimiĝi per ĉaspecaj aventuroj, kiuj igas la heroon fali ĉiam pli profunden. Tial tiuj aventuroj, eĉ kiam ili estas eksterordinaraj, estas finfine naturaj...

... Finfine, se oni volus resumi romanojn, kiel « la Príncipe de Clèves », « Adolphe » de B. Constant, « Le blé en herbes » de Colette (Nematura tritiko) k.s. (mi elektas intence verkojn de tre diversaj epokoj), oni povus tion fari en kelkaj linioj. Por Manon Lescaut tio ne estas ebla, aŭ oni devus diri la jennon : « Enamigite al Manon, la juna kavaliro Des Grieux travivas kun ŝi diversajn aventurojn en la Parizo de la 18-a jarcento. Finfine, Manon estas forsendita al Ameriko, kien Des Grieux sekvas ŝin kaj kie ŝi mortas. » « Ili travivas diversajn aventurojn » sed se ni ne scias kiujn kaj kiajn, ni perdas multon el la senco mem de la romano...

... Ni do povas kalkuli la peripetiojn : pro Manon, Des Grieux fuĝas de la patro domo, de la passtra seminario, de la malliberejo, de la kolonia urbo. Dume, ŝi lin forlasas trifoje por iri al pli riĉa amanto. Des Grieux estas trifoje enkarcerigita, Manon dufoje ; se al tio oni aldonas unu incendion, unu ŝtelon, du murdojn, unu duelon kaj plurajn aliajn perfortaĵojn kaj senmbron da hazardaj renkontiĝoj, estas malfacile diri, ke tiu amromano — oni eĉ foje diris : psikologia romano kaj eĉ morala romano — ĉefe konsistas el aventuroj.

Sed ĉiuj tiuj aventuroj ne estas nura distro por la leganto. Ili estas kondiĉitaj per la karaktero de la herooj mem. Ili ne estas la hazardo de eksteraj cirkonstancoj. Kiel la peripetioj de klasika tragedio, ĉiu el tiuj aventuroj estas paŝo al la destino de la herooj, al la tragedia fino...

... Ke ĉiuj tiuj aventuroj estas nur pretekstoj por priskribi la psikologion de la herooj, tion ŝajnas konfirmi la fakto, ke Prévost priskribas tiujn aventurojn tre sobre...

... Eĉ la forfuĝo de Des Grieux el Saint-Lazare okazas tre facile, kaj en ties priskribo Prévost eĉ emmetas certan humoron. Ŝajnas ke ĉiuj tiuj aventuroj estas por Prévost simplaj formalajoj, kiujn li plenumas ridetante.

Tamen li kelkfoje amasigas aventurojn, kies neceseco estas tre dubinda, kies nura utilo estas pipri la rakonton. Ni supozu, ke la epizodo pri la itala princo (kiun Prévost aldonis en 1753) prezentas psikologian intereson, kiel asertas la aŭtoro, sed la forrabo de la filo de G... M... fare de la korpogardistoj dum Des Grieux dividas kun Manon lian vespermanĝon kaj liton, estas amuzaĵo de la aŭtoro, ekstravaganca epizodo. Same, la murdo de la servisto dum la forfuĝo el St-Lazare, same la murdo de Lescaut : senkonsekvencaj kaj senrezultaj epizodoj, kiuj nepre memorigas la pure aventurajn romanojn...

... Sed kio plej gravas estas la etoso, la kadro. Kaj tiu etoso estas tiu de la aventurromanoj pro multaj detaloj kaj notetoj, precipe la rolo de la mono kaj de la ludo. Sub niaj okuloj evoluas tuta mondo de aventuristoj el ĉiuj sociaj tavoloj : de la princo de... kaj la duko de..., ĉefoj de bando de kavaliroj-friponoj, ĝis la lakeoj, kiujn oni facile koruptas per kelkaj moneroj. (Ekz. : la servisto de la Hospitalo, la fiakristo, k.a.). Ĝi estas la mondo de koruptado ; ni evoluas meze de la kanajlaro de la tiama socio en mondo, kie oni intermurdigas pro afero de virino aŭ kverelo de ludo. Vidu ekzemple kiel M. de T. proponas al Des Grieux reakiri Manon pere de armiloj. La entrepreno de Des Grieux

por liberigi Manon sur la vojo al Le Havre ne estas nur la lasta ekstremaĵo de la heroo por savi sian amatinon, ĝi estas la entrepreno de aventuristo, tia, kiaj ekzistis multnombraj ekzempleroj en tiu epoko.

Ofte ni sentas nin en etoso de romano de Dumas : scenoj en gastejoj, arkistoj, ŝargigantaj pistoloj, elingigantaj spadoj... Foje ni sentas la detektivromanon, ekz. dum la pridemandado de Des Grieux fare de la ĝenerala Polica komisaro, kaj eĉ ni flaras la nigran romanon : « Jen estas Lescaut, li diris pistolpafante ; ĉiĉespere li festenos kun la anĝeloj »...

... La plej interesa rolo, la plej pitoreska estas sendube la frato de Manon, kiu kunigas ĉiujn ecojn de la perfekta aventuristo : brutala soldato, ludfripono, amormakleristo, plie malkuragulo : li fanfaronas antaŭ senarma homo (t.e. la fiakristo post la forfuĝo de Manon el la hospitalo), sed tremas vidante spadon (kiam Des Grieux lin minacas). Tiu ĉi ege pitoreska persono, tiu ĉi brutalulo simbolas la krudecon kaj koruptecon de la medio, en kiu vivas kaj agas niaj geherooj.

Do, la romano de Prévost enkondukas nin en la etoson de la aventurromano. La aŭtoro, malgraŭ la sobroco de sia stilo, malgraŭ la klasika deco, kiun li plej ofte respektis (enestas tre malmultaj vere realismaj priskriboj), tamen ne domagis la detalojn por krei tiun etoson...

... Ni vidas, ke ne estis paradokse aserti, ke Manon Lescaut estas aventurromano ĝuste tial, ĉar ĝi estas amromano.

M. DUC GONINAZ

Prezidanto de la Franca Esperanto-Instituto.



Ĉu vi pagis vian abonon ?

Ĉu vi abonigis viajn eksterlandajn amikojn ?

Atentu pri la nova poŝtĉekkonto :

Pierre BABIN

5, boulevard Buisson

17 - Rochefort-sur-Mer

C.C.P. Nantes : 2.813.61

Kial unu Dolmeno en Baugé ?

(Prelego Pasko 1966)

La vorto dolmeno signifas ŝtonotablo. Ĝi estas farita el du keltaj radikoj : dol = tablo ; men = ŝtono. Laŭ la kelta sintakso oni devas kompreni, ne tabloŝtono sed, kiel antaŭe dirite, ŝtonotablo.

Kaj tuj mi devas detruiri eraron : oni ĝenerale kredas, ke, se la nomo estas kelta, enkaŭ la aĵo tiel nomata estas kelta. Sed la dolmenoj apartenas al antaŭkelta periodo, same kiel la plej granda parto el la megalitoj. Oni trovas ilin tie, kie neniam la keltaj triboj vivis, kaj oni precize kalkulis, ke ili estis starigitaj antaŭ la alveno de keltoj.

Kial do oni nomis ilin tiel ?

Oni tiel nomis ilin, unue ĉar oni erare pensis, ke ili estis starigitaj de keltaj triboj, due, ĉar ili estas grandamase troveblaj en Bretonio kaj en aliaj Okcident-Eŭropaj landoj, kie vivis keltoj ; sed la du faktoj estas sendependaj.

La vorto *dolmen*, estis kreita nur dum la dekoka jarcento de kelkaj personoj, kies keltaj sentoj estis pli ol ordinare grandaj.

Ĝis nun, mi parolis nur negative.

Tri problemoj aperas koncerne la dolmenojn :

Kiam kaj de kiuj ?

Kiel ?

Kial ?

Ni pritraktu la unuan problemon.

Ni nun scias, ke la Indo-eŭropaj grupoj kaj triboj ne estis la unuaj okupantoj de Eŭropo. Antaŭ ili, aliaj grupoj ekzistis tri mil aŭ kvar mil jarojn antaŭ kristnasko. Kiam la unuaj keltaj triboj alvenis al Okcident-Eŭropo ili trovis ĝin en stato de megalita civilizacio de Svedio al Portugalio. Tiu megalita civilizacio ekzistis ne nur en Eŭropo sed ankaŭ en Azio. Eble tiu ekstreme grava fakto, tiu impona fenomeno nomata religio naskiĝis inter la megalitaj popoloj.

Je tri mil jaroj antaŭ kristnasko, tiuj popoloj kreis unu el la plej maljunaj skribaj lingvoj : la kuneiforma.




Jen do la respondo al la unua demando : la dolmeno en Baugé verŝajne estis starigita per triboj antaŭ ilia kreado de skriba lingvo, tio estas proksimume tri mil kvin

cent jarojn antaŭ kristnasko, ĉar poste ili estus skribintaj, se ne tutajn frazojn, almenaŭ kelkajn vortojn sur tiuj megalitoj.

La dua problemo estas : kiel ?

Kiel tiuj primitivaj homoj povis transporti tiel pezajn ŝtonegojn kiel, ekzemple, tiuj troveblaj apud Rennes ĉe la Roche-aux-Fées (La Roko de la Feinoj). Kelkaj ŝtonegoj pezas proksimume 40 aŭ 50 tunojn, kaj oni scias, laŭ la naturo de la ŝtonoj, ke la plej proksima loko kie ili estas troveblaj estas je distanco de 4 - 5 kilometroj !

Ĉar neniu el ni ĉeestis iun ajn megalitan kongreson, ni povas nur imagi la metodon : oni verŝajne uzis grandan amason da homoj puŝantaj aŭ tirantaj la ŝtonegojn metitajn sur arbotrunkoj. Oni puŝis, metante arbotrunkojn sur la vojon, antaŭen, deprenante la arbotrunkojn de sur la vojo, malantaŭ la ŝtonoj, kaj metante ilin sur la vojon, antaŭen, ktp. laŭ la sekvantaj desegnaĵoj :



Nun pri la demando : kial ?

La rolo de la megalitaj triboj estis gravega en Azio. Ili fakte estis la pioniroj de civilizacio, de religiaj praktikadoj, de magio. La du fundamentaj pilieroj de iu ajn civilizacio fakte estis religio kaj magio, laŭ la du fundamentaj tendencoj en homoj antaŭ la ekzistado de scienco kaj de sciencaj esploradoj kaj klarigoj. Religio estas respondo al la kial-demandoj. Magio estas respondo al la problemoj : kiel regi, bridi, superforti la eksterhomajn tutpotencajn fortojn de la Naturo. Tiuj ĝeneralaj faktoj helpas nin nun pli bone kompreni la signifon de la megalitoj. Ili estis konstruaĵoj religiaj kaj magiaj ĉar oni devas scii, ke magio naskis longatempe antaŭ la historiaj periodoj de antikvaj Greklando kaj Romo, sendube en Kaldeo. Tiu arto, kiu pretendis kunligi homojn kaj naturajn fenomenojn, povas esti konsiderata kiel praktika religio al kiu oni devas rilati kuracarton kaj astrologion. La disvastigo de magio povas esti klarigita per la historio de megalitaj triboj. La diversaj popoloj, kiuj ankoraŭ hodiaŭ loĝas en la nordaj partoj de Eŭropo kaj Azio apartenas, laŭ ilia lingvistika unueco al granda popolo, kiu iam okupadis larĝegan teritorion antaŭ la arjaj grupoj. Mi ĵus parolis pri lingvistika unueco. Mi tiel taŭge povas paroli pri ilia religia unueco. Malgraŭ suprajaj diferencoj, magiaj praktikadoj estis ĉiam pli malpli similaj. Legu la grandan nacian eposon de la Finnoj « Kalevala » verse tradukita en Esperanto, kaj vi pli bone komprenos tion, kion mi volas diri : kulto de spiritoj, de la kvar elementoj kaj de la Naturo ĝenerale.

La megalitoj, kies rolo estis religia, magia, estis uzitaj ne nur kiel tombejoj sed ankaŭ kiel kvazaŭ-preĝejoj. Kiam la keltoj alvenis, ili trovis popolojn organizitajn en triboj kaj en diversaj megalitaj religioj. La keltoj fakte ne konstruis tiujn primitivajn monumentojn ĉar ilia religio malpermesis tion al ili. La Druidoj malpermesis la konstruadon de temploj kaj ankaŭ la reprezentadon de Diaĵoj. Druida filozofio estas tre malbone konata ĉar skriban lingvon ili ankoraŭ ne posedis. Ĉio estis memorigita per kere. Kun ili komencis aŭ prosperis la kulto de bestoj. Unue, oni ne povis manĝi ilin ĉar ili estis konsiderataj kiel diaĵoj : leporoj, anseroj, kokinoj kaj kokoj ne estis, laŭ la druidoj, manĝeblaj. Kaj, laŭ la kutimo ĉe primitivaj religioj, tio, kio estis malpermesata, poste estis ege permesata laŭ alia nova ideo : se vi deziras havi la kvalitojn reprezentitajn en la bestoj nepre manĝu ilin kiel kuracilojn aŭ magiilojn !

Tiuj primitivaj kutimoj ne povis esti detruitaj de la sekvintaj religioj, kiuj konsekvence preferis gardi kaj adapti la antikvajn kredojn por konservi la plej grandan nombron da fideluloj. Kiam Kristanismo aperis, speciale en Bretonio, anstataŭ konstrui krucon apud megalitoj oni surmetis ŝtonan krucon sur la kultindan ŝtonegon. Kaj oni akceptis kokojn sur niaj preĝejoj. Kokoj estis respektataj ĉar oni kredis, ke ili helpis forpeli fulmobatojn. Kaj nun ? Nun, ĉar ni travivas sciencan epokon, ni povas vidi, sur niaj preĝejoj krucon, kokon kaj... fulmoŝirmilon !

ROBERT MARTIN.




GRAVAJ



Antaŭ 225 jaroj mortis en Vieno :


ANTONIO VIVALDI. — La virtuoza itala komponisto estas unu el la plej famkonataj majstroj. Li ĉefe komponis verkadojn por violono kaj orkestro. Li estis kapelestro en la Sankta-Marko preĝejo kaj samtempe direktoro de la Konservatorio. J.S. Bach transformis multajn liajn koncertojn en koncertojn por orgeno kaj klavicheno.

DATREVENOJ



Antaŭ 20 jaroj mortis en Silezio :

CERHART HAUPTMANN. — La plej eminenta germana dramisto en la jarcento estis unu el la unuaj « naturalistaj » literaturistoj. Lia nomo ligiĝas al tiu de la plej grandaj aŭtoroj de la lasta generacio. Liaj plej konataj verkoj estas : « La teksisto », « Rose Bernd » kaj « La kastor felo ». Li ricevis la Literatur-Nobel premion en 1912.



Antaŭ 5 jaroj mortis en Ketchum :

ERNEST HEMINGWAY. — La usona verkisto, « marlupo » kaj aventur-amanto jam en siaj junaj jaroj, ricevis la Literatur-Nobel-premion kaj la Pulitzer - premion. La dura stilo kiun li majstre uzis en sia rakonto « La maljunulo kaj la maro », karakterizas la krudan raelismon troveblan en ĉiuj liaj romanoj.

La lando de Region Maud (2)

Novelo de Zorja Danovskaja

Sub la piedoj degelis neĝo. De la maro blovis varma vento. Senvestaj malhelaj akacioj balanciĝis en la vento. Li kisis ŝin unuafoje en la bulvaroj, kaj vento forskuis sur ilin aron da akveroj de interplektitaj branĉoj. Ili kuris, ridante, mano en mano, kaj la vento kuris por atingi ilin.

— Mia kapo estas tute malseka, — ridante diris Zinjo.

Ili enkuris iun pordegon. La urbo estis plena je muziko, ĉi nokte. Ĝi estis ŝvingata el ĉiuj pordoj: patefonoj, radioriceviloj, pianoj... Aŭdigis kantado kaj rido. Ili staris, ĉirkaŭpreninte unu la alian, en la enirejo. Ial estis mallumo.

— Ĉu vi memoras? Same, kiel tiam, — diris Zinjo.

Kiam ĉio iĝis tiel malbona kaj Zinjo konsideris la eventojn unu post la alia, ŝi rememoris en ĉiuj detaloj la novjaran nokton. Kiel bona ĉio estis? Ili tiom bezonis unu la alian. Pasis multe da tempo, antaŭ ol ili komprenis: ili aliĝis, ili ne havas pri kio paroli, pensas pri diversaj aĵoj, ne kapablas gardi unu la alian...

Kvazaŭ neniam estus la malproksimaj jaroj de la lernejo, la multaj tagoj, pasigitaj kune. Kvazaŭ ili ne revis, ĉirkaŭpreninte unu la alian, sur la kanapo, pri foraj landoj kaj herooj. Foje ŝajnis al Zinjo ke ŝi estas kulpa, ke necesis agi alimaniere, sed ŝi ne povis kompreni, kio ĝuste necesas.

— « Ĉu vi memoras la Landon de Regino Maud? » — per falinta voĉo demandis Zinjo, penante savi almenaŭ ion.

— « Vi estas stranga », — respondis Andreo —. « Ni ja estas plenaĝaj homoj ». Andreo bone lernis. Somere de la jaro li foriris navigon. Kaj Zinjo finis la kurson. Ŝi estis sendota al granda fora konstruo. Ŝi ploris, petis permeson resti en la urbo, sed la prezidanto de la distribua komisiono, grizhara homo kun laca vizago, respondis al ŝi malvarme:

— « Se vi ne volas tie labori, estas via afero. Sed du jarojn labori laŭ kondiĉo vi devas ».

La dekkvina de aŭgusto Zinjo devis jam aperi ĉe ŝia laborloko, sed Andreo ne revenis. Ŝi prokrastis sian elveturon, riskante havi gravajn malagrablaĵojn. Elĉerpigis ŝia mono. Ŝi kaŝis sin de la konatoj, timante demandojn.

Andreo venis nur je fino de aŭgusto. Plorante, Zinjo rakontis al li pri siaj aferoj. Andreo sidis malsekne ĉe la fenestro. Li komprenis kion ŝi atendas. Li devis diri la lastan vorton. Li iĝis sin kompreni, kio ĝuste okazis. Li tiom amis ŝin, kaj jen nenio estas, nur indifereco.

— « Andreĉjo! Kio okazis al vi? Vi estas tute alia! » — ekĝemis Zinjo, alpaŝinte lin. Kaj ekploris ankoraŭ pli forte, kompreninte, ke ŝi atendis vane.

Kaj Andreo pensis pri tio, ke oni fidis al li difini la kurson de la ŝipo, kiel li revis rakonti ĉion al Zinjo, revenonte bordon. Ŝi renkontis lin en larmoj, malbela, malfeliĉa. Iu malbona sento simila al abomeno kreskis en li.

— « Vi iĝis fremda al mi », — ploris Zinjo. — « Sed vi ja diris, ke vi ĉiam amas min. Kiom multe promesis, Andreĉjo! Kial do vi diris tion? » Kion li povis respondi?

— « Jen, Zinaida », — diris Andreo, ekstare. — « Mi jam ne amas vin. Mi ne scias, kial. Oni ne povas trudi la amon. »

— « Andreĉjo », diris Zinjo, — « eble mi vin ofendis iel? Eble io estis ne kiel vi volis? Diru al mi, Andreĉjo! » — Ŝi ne povis paroli pro larmoj.

— « Mi ne plu havas, kion diri, ». Zinjo rigardis lin, kaj la rompita fiero splitis ŝian koron. Trafulmis la penso: kiel malbone aspektis la sceno dum la distribuo, kia honto! Kaj li kaŭzis ĉion!... Sed ĝi jam havis nenian signifon.

— « Ĝis revido, Andreo, » — diris Zinjo firme. Li foriris, sed lia animo estis ankaŭ maltrankvila. Kaj Zinjo volis ĉeti ion terure ofendati al li postsekven, kvazaŭ ŝtonon, sed ŝi retenis sin, pensante nur: « Kial do! Ĉu li kulpas, se li ĉesis ami? Vere, amon oni ne trudus. Estas mia kulpo », kaj la koro dolo-

ris broge. Kiam Zinjo rememoris Andreon kaj la tutan sian antaŭan vivon, ĉio ŝajnis al ŝi sonĝo. Ŝi vivis ĉe la maro. Ŝi revis pri forraj landoj. Ŝin amis Andreo. Aŭdaca maristo amis la reĝinon Maud. Sed ĉio ĉi ne estis vero, ĉio estis elpensita. Estis for de reala vivo. La reala vivo estis tio ĉi. Tie ĉi estis varmega stepo, ardigita de la suno, kvazaŭ argila poto. En la stepo mankis akvo. Ke mezo de somero plende kliniĝis pitoreskaj suproj de floroj kaj herboj; seka herbo brulvundis krurojn kvazaŭ urtikoj. La homoj vivis en batalfronto. Ili leviĝis kun la unuaj sunradioj kaj okupis siajn lokojn en pezaj maŝinoj. Stepaj ŝipoj krude renversadis ŝtonigint grundon. Gigantaj fosiloj ĉerpis la teron, kaj ĉiu tago antaŭenigis la kavegon de l'estonta kanalo. Tagmeza suno surrampis la alton rekte super la kapo; la radioj torente verŝis la fluojn de fajro. Kaj foje iu, ne elteninte la fajran atakon, kliniĝis ĉe la stirrado. Sunfrapo. Tiam aperis Zinjo. Ŝi agis decide kaj nerapideme. En ŝia sektoro ne okazis gravaj akcidentoj. Ŝi gardis la homojn, kiujn oni konfidis al ŝi. Ŝi estis eta, maldika. La suno plie sekigis kaj hardis ŝin. Solece kaj ŝlosite ŝi portis en la koro sian nekuraĉeblan doloron, sed ŝi defendis aliajn de la doloro.

Si estis ŝatata.

Tio okazis unu jaron post ŝia alveno. Ŝi memoris, kiel ŝi alvenis. Neniu riproĉis ŝin pro malfruigo. La homoj estis bezonataj, kaj tempo mankis por konversacioj. Oni donis al ŝi la tutan inventaron: ĥalateojn, apotekojn, bastojn kaj similajojn, — sidigis ŝin en laŭvojan kamionon kaj sendis ĉi-tien, en stepon. Pluen ĉio pasis ordinare. Vintro iĝis malfacila. Precipe, kiam ekblovis la terura glacia vento. Aperis frostiĝintoj. Ŝi flegis ilin ĝis resaniĝo, kiel patrino. Ŝi mem frostumis la manojn, helpante al ŝoforo, kun kiu ŝi revenis al la sektorejo ripari la kamionon. Estis tridek gradoj, kaj ŝiaj manoj estis tro delikataj. Tion ŝi diris al neniu. Ŝi faris ban daĝojn, sulkigante la brovojn pro doloro, sed neniu elsciis pri tio. Al ĉiuj estis malfacile, sed neniu plendis.

(daŭrigota).

NOTOJ PRI LA AŬTORO

Zorja estis neordinare dotita homo.

Kiam venas tempo paroli pri ŝi, estas ĉiam malfacile decidi, de kio komenci... Ĉu de tio, ke ŝiaj gepatroj unue renkontiĝis dum Esperanto-kurso, gvidita de E. Aisberg en la

benita urbo en sudo de USSR — Odesso — la nigramara paradizo. Ĉiuj ili estis tiam junaj, esperoplenaj, avidaj je scioj...

Ĉu de tio, ke ŝia koro ĉesis bati ĝuste du tagojn antaŭ la lanĉo de l'unua Soveta sputniko sur orbiton. Ĉar ja nur post tio ŝi eminentiĝis, kiel peoto, verkisto, dramaturgo...

Nur post ŝia morto estis prezentitaj en teatroj du ŝiaj dramoj: « Liberaj majstroj » kaj « Tie, kie ne subiras la suno »; en literaturaj revuoj aperis ŝiaj versaĵoj kaj la novelo « La tero de reĝino Maud ». Sed ŝia trivoluma romano « Sagujo pri virino », same kiel tri aliaj ŝiaj dramoj, kinoŝcenario kaj multaj versaĵoj ĝis nun ankoraŭ atendas la publikigon.

Ŝi naskiĝis la 19-an de septembro 1930, en Odesso.

En infaneco ŝi estis sprita, gaja, impeta knabino. Sed ensagis la kruela milito en la junan vivon. En aĝo de dektri jaroj ŝi, lernante en meza lernejo, samtempe laboris en uzino. Estis necesa ŝia laboro. La tempo estis urĝa.

En 1954 ŝi finis la studojn en Moskva Stata Universitato. Fininte filologian fakultaton — iran fanon, — ŝi forveturis labori en Tadjikistanon. Meza Azio kun ĝiaj sabloj kaj dezertoj, orientaj moroj kaj buntaj vestaĵoj ravis ŝin. Ŝi laboris kiel redaktoro. Tie estis publikitaj en ĵurnaloj ŝiaj unuaj versaĵoj.

La lastan tempon ŝi gvidis vilaĝan klubon apud Moskvo, ŝiaj priskriboj de la 6-a Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj, en kiu ŝi aktive partoprenis kune kun geknaboj de la vilaĝo, estis tiom impresaj, ke ĝis nun konserviĝis kalejdoskopaj pitoresko de viva ĉeno de eventoj kvazaŭ en animigita kolor-gravuraĵo. Ŝiaj eksplicitaj bildoj sentigas la inspiran spiregon de tiuj varmegaj tagoj...

Sensenca kunpuŝigo de du aŭtomobiloj, en kiu estis ĉesigita la talenta vivo estis absurda ŝiro de la kreaĵ iniciatoj, kiuj svarmis kaj plaŭdis en la juna, energia, emocia kaj erudicia verkistino.

Tio okazis la 2-an de oktobro 1957. Do baldaŭ jam dek jaroj estos pasintaj de tiu tragedia tago.

Sed ĝis nun imponaj neĝe blankaj krikantemoj kaj versaĵoj en pleksiglasaj kovriloj, kiujn alportas ĝeamikoj de Zorja por ornamo la tombon, ŝajnas iu malica miskompreno...

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

La 1965-66 konkurso nun finiĝis. La korektantoj laboras. La gajnintoj ricevos la rezultojn rekte. La listo aperos en la venonta numero de Kulturaj Kajeroj. Kaj post libertempo, kiun ni deziras fruktedona kaj ĝojplena, komenciĝos nova konkurso.

..

AMUZAJ PROBLEMOJ

Solvo de la lastaj problemoj : -

La miksajo. — Ni supozu, ke la miksajo entenas 30 centojn da litroj. La sama kvanto da la pli multekosta vino estus : $150 \times 30 = 4500$ fk. 30 litrojn da miksajo kostas $140 \times 30 = 4200$ fk. La diferenco kun la prezo de la miksajo estas : $4500 - 4200 = 300$ fk. Kiam vi anstataŭas unu centon da litroj de la unua vino per sama kvanto da la alia, la diferenco estas : $150 - 135 = 15$ fk.
 $300 : 15 = 20$

Oni devas preni 20 centojn da litroj de la dua vino kaj $30 - 20 = 10$ centojn da litroj de la unua vino. Do propocio : $10 \quad 1$

$$\frac{-}{20} = \frac{-}{2}$$

Kompletigu :

884767	85
85	10409
34	
347	
340	
776	
767	
765	
2	

Ekspliko : la dividanto estas 85. La dua cifero de la kvociento estas « 0 » ĉar $34 < 85$.

La produto $85 \times 9 = 765$; $765 + 2 = 767$.

La lasta parta dividato estas 767, kies 3 ĉiferoj estas la tri ciferoj de la dividato kiu estas 884767. La tria parta dividato estas « 76 » ; $76 < 85$. La kvara cifero de la kvociento estas « 0 ». Tiu kvociento estas 10409.

NOVAJ PROBLEMOJ

Kurioza maniero vojaĝi :

Du personoj havas nur unu biciklon por iri de A ĝis B. $AB = 20$ km. Ii foriras de A samtempe la unua bicikle ĝis punkto C inter A kaj B je rapido de 15 km./h. ; la dua piede je rapido de 4 km./h. Kiam la unua persono atingas la punkton C, li metas la biciklon sur la bordo de la vojo kaj daŭrigas la iradon piede je rapido de 5 km./h. La dua persono trovas la biciklon, ekrajdas ĝin kaj finas la vojiraĝon je rapido de 12 km./h. La du persono alvenas en B samtempe.

Kalkulu la distancon AC.

..


LABIRINTO

La ruza simieto

Ĝi jetas kokoson de la supro de la arbo. Kiu viro ĝin ricevos ? Sekvu la direkton indikitan de la montr-sagetoj.




GRAMATIKO PER BONHUMORO



— Ekzemplo sekvenda de ĉiuj naturami-
koj !




— Ĉu tio signifas, ke mia supo ne estas man-
ĝinda ?



— Metodo sekvota de la legemaj lacertu-
mantoj !

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (39 aŭst. ŝil.).
- Belgujo** : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (70 fr.).
- Britujo** : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (10 ŝil.).
- Ĉeĥoslovakio** : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (1,50 us. dol.).
- Danlando** : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (10 kr.).
- Finnlando** : S-ino Kerttu Väättänen, Mäntyläntie 4, LAPPEENRANTA 5 (6,2 mk.).
- Germanujo Okc.** : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33, - pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (5,6 mk.).
- Hispanujo** : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1º, la, BARCELONO (77 pes.).
- Italujo** : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (840 lir.).
- Jugoslavio** : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1260 d.).
- Nederlando** : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (5 guld.).
- Norvegujo** : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg. 56, LAMBERTSEDER (10 kr.).
- Pollando** : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (50 zl.).
- Svedujo** : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk. 157007 (8,4 kr.).
- Svislando** : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).
- Tajlando** : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).
- Usono** : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (1,50 dol.).
- Aliaj landoj** : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncintajn

Aktepas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plilerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo